

BOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA NOVADO



ĈINAJ INTERVENULOJ, FOR EL VJETNAMIO!

Kun profunda kolero kaj indigno eksciis la sovetaj esperantistoj pri la aroga atako de Ĉinio kontraŭ la turmentegita per multjaraj militoj Vjetnamio. La pacama vjetnama popolo denove estas devigita preni la armilojn, por defendi la liberon kaj sendependecon de sia lando. La ĉina agreso kreas seriozan minacon al paco en Sud-Orienta Azio kaj en la tuta mondo. Ĝi ne povas lasi indiferenta eĉ unu honestan homon sur la tero.

La sovetaj esperantistoj esprimas senrezervan solidarecon kun Socialisma Respubliko Vjetnamio kaj plenas je decidemo helpi kaj subteni la heroan vjetnaman popolon. Ni postulas de la regantaj rondoĵoj de Ĉinio senprokraste ĉesigi la agreson kaj forigi ĉiujn truĵojn desur la teritorio de SRV. Ĉinaj intervenuloj, for el Vjetnamio! Vjetnamio venkos!

Sovetunia sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Moskvo, la 21-an de februaro 1979.

KION FARI?

Tiu ĉi demando ne lasas la kapojn de multaj nialandaj esperantistoj nun, kiam maturiĝis kaj pretas fali sur tiujn kapojn nova frukto - Asocio de sovetiaj esperantistoj.

Apero ĝia estas fenomeno tute natura.

Dum pli ol dudek jaroj esperantistoj agadis dise kaj kune, revente pri tiuj tempoj, kiam iliaj penoj estos agnoskitaj de la socio, de la instancoj. Tiu agado ne estis facila, ĉar ne multaj esperantistoj feliĉis esti komprenataj pri siaj revoj kaj streboj. Ne havante oficialan subtenon, ili ne povis ne agi meminitate. Ili instruis Esperanton, korespondadis kun eksterlandaj samideanoj, organizadis klubojn, penetradis internaciajn E-organizaĵojn kaj eĉ ties gvidorganojn, peradis abonadon al E-gazetaro kaj liveradis eksterlandajn E-librojn, eldonadis proprajn bultenojn kaj eĉ organizis tutsovetian junularan E-movadon kun regionaj renkontiĝoj, tutlandaj tendaroj kaj ĝeneralaj konferencoj. Ĉio ĉi estis, ĉar ne povis ne esti.

Esperantistoj agadis verve kaj sindone, konstatante kun miro, ke la ĉirkaŭanta ilin homa medio ne admiras kaj ne subtenas ilian agadon. Sed ĉu ne vana estis la miro? Kial la socia medio devias admiri tiun agadon? Jes ja, la kulpo estas grandparte nia. Ĉar ĉiu aparta esperantisto, ĉiu klubo, eĉ SEJM entute konsideris sia unua devo kaj tasko propagandon kaj disvastigon de Esperanto. Sed ne tion bezonas la socio, la homoj nin ĉirkaŭantaj, la superaj kaj nesuperaj instancoj.

Esperantistoj opinias, ke ilia ideo estas nobla, revolucia, por-socia, mondosava ... kaj agadas plejparte sekteme, propraronde, nur

(daŭrigo sur p.78)

SOLIDARECON KAJ SUBTENON
AL LA KAMPUĈIA POPOLO!

La reginta en Kampuĉio faŝista bando de Pol Pot - Jeng Ŝari imundis la landon per sango, kondukis la ekonomion al ruinigo kaj la popolon al mizero. Ĉiuj honestaj homoj de la planedo kun kolero kaj indigno eksciadis pri la krimoj de la kontraŭpopola reĝimo, pri la politiko de genocido, pri la ekstermado de milionoj da senkulpaĵ homoj, inkluzive virinojn, maljunulojn kaj infanojn. La nigrofaroj de la propekina bando superis eĉ la krimojn de hitleranoj. Efektivigante la volon de Pekino, la faŝista bando malbridis la liman militon kontraŭ Socialisma Respubliko Vjetnamio, semante morton kaj detruadon en la multsuferinta vjetnama tero.

Ne volante esti tute nenigita, la kampučia popolo leviĝis al sankta lukto por sia saviĝo. Tiu lukton sub gvidado de Unuiginta Fronto por Nacia Saviĝo de Kampučio kronis faligo de la faŝista bando kaj proklamo de Popola Respubliko Kampučio. Sur la kampučian teron venis paco. La popolo iĝis mastro de sia sorto. Komenciĝis konstruado de nova vivo en kondiĉoj de demokratia socio.

Tamen reakciaj fortoj de kelkaj landoj, subtene al la faligita sanga reĝimo, malbridis kampanjon de mensogoj kaj kalumnioj kontraŭ la popola Kampučio. En tiuj kondiĉoj ĉiuj pacemaj fortoj de la planedo devas doni rebaton al la intrigoj de la reakcio kaj firme subteni la heroan popolon de Kampučio.

Ni alvokas esperantistojn de ĉiuj landoj kaj ĉiujn honestajn homojn partopreni la kampanjon de solidareco kun la kampučia popolo kaj helpi al Popola Respubliko Kampučio en rekonstruado de la nacia ekonomio.

Membroj de Moskva junulara E-klubo,
partoprenintoj de la labortago de
solidareco kun la kampučia popolo.

Moskvo, la 28-an de januaro 1979.

SEKVINDA EKZEMPLO

La 28-an de januaro Moskva junulara E-klubo en la konstruejo de la ĉefa prescentro de Olimpiko-80 organizis labortagon de solidareco kun la kampučia popolo. Kune kun esperantistoj la labortagon partoprenis komsomolanoj el la eldonejo "Progress" kaj eksterlandaj kunlaborantoj de la eldonejo el Vjetnamio, Laoso, Francio kaj Srilanko.

Antaŭ la laboro estis organizita mitingo. La partoprenintoj tenis sloganojn en la rusa lingvo kaj Esperanto: "Vivu la heroa popolo de revolucia Kampučio!", "Ni laboras por Kampučio!", "Esperanto servu pacon!", "Sovetaj esperantistoj solidaras kun Popola Respubliko Kampučio!". La mitingon malfermis la ĉefa organizinto de la arango D. Perevalov. Lin sekvis parolo de franca komunisto M. Parra, kiu aprobis la iniciaton de moskvaj esperantistoj kaj substrekis gravecon de similaj arangoj. La mitingantoj per minuta silento honoris viktimojn de la faŝista reĝimo. Konklude moskvaj esperantistoj akceptis la alvokon "Solidareco kaj subtenon al la kampučia popolo!" (vidu ĉi-supre).

La monon, perlaboritan dum la labortago, oni transdonis al Sovetia Pacfonduso, por Popola Respubliko Kampučio.

Santage vespere kaj sekvatage Moskva radio elsendis en ĉiuj fremdaj lingvoj pri tiu ĉi arango. Ankaŭ Tutsovetia radio ruslingve informis pri la evento. TASS, kies korespondanto ĉeestis la mitingon, dissendis informon tra la lando kaj eksterlanden. La informon

de TASS la 30-an de januaro publikigis "Komsomolskaja pravda", sam- tage aperis artikoleto de D. Perevalov en "Sovetskij sport". Kvankam en tiuj informoj ne estis menciita partopreno de esperantistoj, ilia aperigo tamen montras ĝeneralan gravecon de la arango.

En intervjuo por vjetnamlingva elsendo de Moskva radio D. Perevalov en la vjetnama lingvo rakontis pri la labortago de solidareco kun Kampuĉio, pri Moskva junulara E-klubo, pri sia esperantiĝo dank' al vjetnama esperantisto Hoang Ngok Boj kaj esperantlingve gratulis vjetnamajn esperantistojn okaze de la novjara festo (laŭ la luna kalendaro). La 1-an de februaro populara vjetnama ĵurnalo "Kuan doĵ njan zan" publikigis informon de moskva korespondanto de VIA kun mencio, ke la labortagon organizis nia klubo. Similaj informoj estas atendataj en "XX jarcento kaj paco", "Moskvaj Novaĵoj", vjetnamlingvaj eldonoj de la revuoj "Soveta Unio" kaj "Sovetia Virino".

Do, moskvaj esperantistoj montris bonan ekzemplon, kiel oni povas perafere pruvi, ke Esperanto estas grava kaj konsiderinde ilo por internaciisma laboro kaj propagando de progresemaj ideoj. Kaj ni esperas, ke junularaj E-kluboj sekvos nian ekzemplon, ĉar ĉiuj esperantistoj devas unuavice esti veraj pacbatalantoj kaj internaciistoj.

N. Soroŝova, SR de Moskva junulara E-klubo.

I N F O R M I L O N^o 1

pri la 21-a Orient-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro
(OrSEJT-21)

La tendaro estas dediĉata al la 60-jara jubileo de Krasnojarska komsomola organizaĵo.

Devizo de la tendaro estas:
"Esperanto servu pacon, amikecon, internacismon kaj socialan progreson!"

1. Loko. OrSEJT-21 okazos en Krasnojarska regiono, je preskaŭ 60 km de la urbo Krasnojarsk, surborde de Krasnojarska maro. La tendarejo situas apud la bela urbo Divnogorsk proksime de la mndfama hidroelektrostacio. La loko tre facile atingeblas per trajno, aŭtobuso, rivertramo.
2. Tempo. La Paroliga periodo (PP) okazos la 1-an - 5-an de aŭgusto 1979. La tendaro okazos la 5-an - 15-an de aŭgusto.
3. Programo. La programo nepre enhavos Esperanto-instruadon en ĉiuj niveloj kaj seminarion de Esperanto-aktivularo. Krome okazos: ekskursoj, somera prelegejo, belartaj konkursoj, festoj, aliaj interesaj kaj agrablaj programeroj.
4. Logado kaj mangado. Partoprenantoj de PP, disdividitaj je grupoj po 10 - 15 homoj, loĝos en kutimaj turismaj kondiĉoj - porteblaj tendoj, dormosakoj, komunaj kaldronoj ktp. La grupojn gvidos spertaj aktivuloj kaj instruistoj. Nejunaj kaj malsanaj esperantistoj restos en la tendarejo. Logado dum la tendaro - en bonaj duĉambraj lignaj dometoj (po 3 homoj en unu ĉambro) kun lito, tolaĵo ktp. Mangado - en la tendara mangejo, vespera teo ĉe lignofajro.
5. Partoprenantoj. La paroligan periodon kaj la tendaron rajtas partopreni ĉiuj sovetaĵ esperantistoj, kiuj konsentos obei la tendaran disciplinon kaj tagordon. Ĉiu aliĝonto devas havi rekomendon de prezidanto de la klubo aŭ grupgvidanto. Prezidanto de la klubo kaj gvidanto de la delegacio plene respondecos pri disciplino kaj lingvonivelo de la rekomenditoj.

6. Kotizo estas duparta.

A. aligkotizo por la organizaj aferoj: 3 rub. por lernantoj, 4 rub. por studentoj, 5 ru. por ceteraj.

B. partoprenkotizo por manĝado kaj loĝado: por ĉiuj 3,50 rub. por ĉiu partoprenotago. Veni por neplena tendara periodo estas ebla, sed nedezirinda. Pagintaj sed nevenintaj esperantistoj ricevos la parton "B" de la kotizo kaj tendaran donaceton.

La kotizojn kaj aligilojn sendu laŭ la adreso: 660075 Krasnojarsk-75, abon. jaŝcik 2420, Urdajevu Aleksandru Jurjeviĉu, ĝis la 10-a de julio. Bonvolu sendi antausciigon laŭ la sama adreso!

T e n d a r a K o m i s i o n o .

POR PLI EFIKA PROPAGANDO

En "Aktuale" N^o 4 s-ano Sapoĵnikov skribis pri propagando de nia lingvo Esperanto pere de ĵurnaloj, TV kaj radio. Certe sen propagando de la lingvo nia laboro estus nula, kaj sen propagando de E-movado ni ne havus tiujn sukcesojn, kiujn ni nun havas. Mi entute konsentas kun k-do Sapoĵnikov, ke skribi en lokaj ĵurnaloj oni devas saĝe, akurate, por ne fari malhelpon al E-movado. Kaj mi volus proponi kelkajn konsilojn surbaze de mia sperto de laboro en kampo de la propagando pere de lokaj ĵurnaloj.

Esperantistoj ofte kunvenadas, okazas multe da renkontiĝoj, tendaroj kaj aliaj aranĝoj. Pri ĉiuj oni peni skribi en loka ĵurnalo - aŭ urba aŭ uzina. Preskaŭ ĉie bone rilatas al Esperanto la redakcioj de lokaj junulgraj ĵurnaloj. Estas tre bone, se vi havas personajn kontaktojn aŭ konas la lokajn ĵurnalistojn. Oni povas eĉ inviti ilin al E-klubo, por ke ili vidu, pri kiuj problemoj okupiĝas esperantistoj.

Ekzemple, vi partoprenis iun E-aranĝon kaj volas ĝin priskribi. La artikoleton vi komencu priskribante iun politikan eventon kiu okazis dum la aranĝo. Se vi skribas ekzemple pri tendaro, unualoke priskribu mitingon, akcentante ke esperantistoj kune kun la tuta soveta popolo solvas la taskojn, kiujn starigis nia partio kaj la soveta registaro. Komencante tiel, vi havas 80% de la sukceso, ke via artikolo estos presita. Sed se vi unue kaj grandparte priskribos la Neptun-feston, tre popularan dum la tendaro, aŭ la bankedon, vi riskos malhelpi la movadon, ĉar el via artikoleto la legantoj povos konkludi ke esperantistoj dum la tendaroj nur okupiĝas pri bagateloj kaj drinkas... Se vi volas propagandi Esperanton, ĉiam memoru ke vi estas soveta homo kaj nia ideologio estas la plej forta kaj vera.

Ĉiu esperantisto kontaktas kun eksterlandanoj - aŭ letere, aŭ dum internaciaj E-renkontiĝoj. Do li devas porti al eksterlandanoj nian sovetan vivmanieron, saĝe kaj sentrude konatigi ilin kun niaj sukcesoj en la konstruado de komunisma socio. Esperantisto estas idea batalanto, sed ne simpla observanto de la eventoj. Por esti batalanto kaj kontraŭstari la burĝan ideologion, esperantisto havu stokon da sciencaj verkoj pri marksismo-leninismo kaj pri historio de internacia laborista movado. Tio estas postulo de la tempo, precipe nun, kiam nia E-movado staras sur la sojlo de la oficialiĝo.

I. Koroljov, subtenanto de SEJM,
esperantisto ekde 1964 (Bijsk).

Moskva Interpacia Esperanto-klubo funebre sciigas, ke la 27-an de januaro 1979 post longa malsano mortis la prezidanto de MIEK Jevgenij Trofimoviĉ SALNIKOV (naskiĝis en 1907, E-iĝis en 1922).

GARDI LA BONAN MEMORON PRI V.I. LENIN:

Traleginte en N^o5 de "Aktuale" du reeĥojn pri la artikolo de M. Zubko en la ĵurnalo "Izvestija", ankaŭ mi ekdeziris esprimi mian opinion.

La artikolo de Zubko povas ŝajni interesa kaj utila por ĉiu leganto, kiu: a) ne konas la interlingvistikajn problemojn kaj la vojojn de ilia solvo, b) eĉ ne imagas, kio estas dialektiko. Mi ne parolos pri la termina ĥaoso (en la artikolo IL kaj ML evidente signifas la samon). Mi volas atentigi jen pri kio. Zubko informas, ke la demando de la sveda gasto V.I. Lenin respondis tiel: "Jam ekzistas tri mondaj lingvoj, kaj la rusa iĝos la kvara". Mi kredas, ke Lenin povis tiel diri, ĉar en 1917 por internaciaj rilatoj ankoraŭ sufiĉis uzi la tri fremdajn lingvojn. Kaj V.I. Lenin interalie mem bone posedis ilin. Kion do konkludas el tio Zubko? Lian konkludon la leganto povas vidi kaj en kaj inter la linioj: V.I. Lenin estis kontraŭ uzado de speciale kreita neŭtrala internacia lingvo, sekve tiel neniam estos. Rimarku, kian dogme rektlinian sencon atribuas la aŭtoro al la vortoj de Lenin!

Esperantistoj estas pli kleraj pri la interlingvistiko, ol ceteraj homoj. Tial mi ne intencas ĉi tie lekcii pri tio, ke UNO jam uzas ne tri, sed ses oficialajn mondlingvojn kaj multe da neoficialaj lingvoj, pri grandegaj monelspezoj ligitaj kun tio, donadi ekzemplojn pri manko de tradukistoj kaj kaŭzita de ĝi kvalito de tradukoj, pri malfacilaĵoj de la sinkrona tradukado, pri neperfekteco de la maŝina traduko, pri la ĉiam plivastiganta internacia kunlaboro en diversaj vivosferoj, pri netaŭgeco de nacia lingvo esti IL kaj pri multe alia.

V.I. Lenin estis brila dialektikulo, kapabla rimarki plej etan ŝanĝon en iu ajn fenomeno. Kaj se li estus vivanta, li nepre rimarkus la grandegajn ŝanĝojn en la lingva situacio. Eksplicite la vortojn de V.I. Lenin - dialektikulo, rajtas nur dialektikulo same brila, sed ne dogmulo! Ja se iam la homaro, obeema al la racio, vaste uzos por internaciaj kontaktoj la internacian lingvon Esperanto, la artikolo en "Izvestija" prezentos la kreinton de nia ŝtato, genian gvidanton kaj elstaran pensulon V.I. Lenin en ne tre bona aspekto. Arbitre eksplikante la eldirojn de Lenin pri la lingva situacio de 1917, M. Zubko faras categoriajn kaj erarajn konkludojn.

La konkludoj de Zubko akordiĝas nek kun lingvosciencaj konceptoj pri la demando, nek kun la filozofiaj, kontestas la dialektikon, anticipe destinas la vortojn de Lenin (fakte ilian misan interpreton fare de Zubko; bedaŭrinde ne ĉiu leganto povas tion distingi) al nerealigebla, transformas la dialektikulon (kaj kian dialektikulon!) je utopiisto, dogmulo.

La artikolo de Zubko estas direktita malpli kontraŭ Esperanto, ol kontraŭ nia bona memoro pri Lenin, kies nomo estas sankta por ĉiu soveta homo. Pri tio mi skribis al "Izvestija" post apero de la artikolo. Ni devas gardi la bonan nomon de Lenin. Nian helan memoron pri li ne tuŝu nekleruloj, nek homoj kun malpuraj manoj!

Gr. Berezin, subtenanto de SEJM (Krasnoarmejsk).

EL LA PROTOKOLOJ DE ILEI
(N^o4-5/1978)

Rezolucio de ILEI.

La 12-a Internacia Konferenco de ILEI, okazinta de la 19-a ĝis la 27-a de aŭgusto en Gorizia, - kiel jam ofte aliloke - konstatis en tiu ĉi regiono la lingvan problemon, kiu malfaciligas la sociajn rilatojn inter la popoloj. Tiucele la Internacia Ligo prezentis konstante sian proponon, ĉiam sub la vidpunkto kontribui al tiu ĉi

grava demando por solvi la lingvan problemon kaj tute ne altrudante la Internacian Lingvon Esperanto.

Tamen, konstatante, ke la registaroj ĝis nun neniam publike prezentis ian ajn solveblecon, ILEI demandas, ĉu la registaroj:

- jam konstatis la distorditan staton rilate la interkompreniĝon inter la ŝtatoj kaj se jes, kiamaniere ili konsideras kontribui al la solvo de la lingva problemo en la rilatoj inter la popoloj,
- intencas proponi sian propran lingvon, ekzemple por la eŭropa komunumo, kiel komunan lingvon, aŭ sub priatento de la homaj rajtoj, estimante ĉiujn lingvojn, por eviti lingvan kaj kulturen diskriminaciojn, proponi neutralan lingvon.

La geinstruistoj membrigantaj en nia Ligo konscias, ke la gelernantoj en la diversaj lernajoj de la mondo ne estas sufiĉe preparataj por respondece partopreni kiel estontaj plenkreskuloj kaj civitanoj la internaciajn taskojn kaj interrilatojn, ĉar la nuna lingva instruado ne kapablas plenumi la postulojn de la estonteco.

Pri IPR.

La estraro de ILEI decidis:

- a) ke la restadstoko de IPR restu en Pisa kaj s-ro Casini tenos ĝin;
- b) ekde la jaro 1979a IPR estos sendata rekte al la abonantoj; tio signifas, ke la sekcioj nur respondecas sendi ĝustatempe la liston de la abonatoj al la kasisto kaj indikas la pagon kaj samtempe ĝiros la monon en la ILEI-kason. IPR estos dissendita rare de Casini unue tiam, kiam li ricevos la liston pere de la kasisto;
- c) ekde la jaro 1979a estos du redaktoroj: redaktoro, kiu respondecas pri la enhavo (faka redaktoro), kaj la redaktoro pri ĉiuj teknikaj aferoj (teknika redaktoro).

La faka redaktoro estos Helmut Sonnabend kaj la teknika redaktoro estos Bruĉjo Casini, tio signifas, ke la teknika redaktoro akceptos kaj aperigos ĉiujn manuskriptojn, subskribitajn fare de la faka redaktoro.

Sendis N.Starodubcev (Doneck).

ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ INVITAS

En julio kaj aŭgusto estas organizataj tri etapoj de la Somera Esperanto-tendaro en Lančov. Ĉiu etapo estas dusemajna, la komenco de la etapo estas dimanĉo. La tendaranoj loĝas en tendoj aŭ kabanoj. Antaŭtagmeze estas lernado de Esperanto en kursoj por komencantoj, por progresintoj, por konversacio, por instruantoj, eventuale aliaj specialaj kursoj. Estas kvar lecionoj kaj leciono de kantado. Posttagmeze estas sportoj, ludoj, ekskursoj, banado, sunumado, konkursoj kaj aliaj amuzoj. La kursoj estas finataj per ekzamenoj, la kursanoj ricevas diplomojn. La tendaro estas relative malmultekosta ĉar la tendaranoj mem plenumas kelkajn devojn kaj obeas la disciplinon partoprenante en la lernado. La tendaro situas en bela pejzaĝo, oni manĝas kvinfoje dum ĉiu tago. La tendaro estas tradicia, ĉi-jare ĝi estas jam la 27-a.

Ne hezitu kaj aliĝu, ĉar la nombro por ĉiu etapo estas limigita. Vi povas ricevi pli detalajn informojn kaj aliĝilojn laŭ la adreso: Esperanto, p.k. 72, CS 674 01 TRĚBÍČ, Ĉeĥoslovakio.

NOVA E-SUPLEMENTO EN "MN"

Jam triafoje la semajna gazeto "Moskvaj Novaĵoj" emisiis specialan E-lingvan suplementon al la angla eldono. La suplemento al N^o 7(2839) enhavas materialojn pri la konferenco de Politika konsulta komitato de la ŝtatoj-anoj de Varsovia Kontrakto (Moskvo, novembro 1978).

OPINIO DE SUBTENANTO

Dum relative mallonga tempo de mia SEJM-subtenanteco mi konvinkigis, ke SEJM, kiel sola en nunaj kondiĉoj formo de organizita E-movado, estas absolute necesa, kaj ĝia funkciado daŭrigenda sub ajnaj kondiĉoj. Kaj mi ĉiam pensis, ke SEJM-likvido ne povas okazi alie, ol post longa kaj ĉiuflanka pridiskuto fare de la tuta SEJM-anaro. Des pli mirigas min la starpunkto de iuj niaj SEJM-gvidantoj pri ĉi tiu demando, ilia hasta, nepripensita preto ĉion likvidi, ĉion nuligi, nur por plenumi iujn "superajn" sugestojn. Ĉio estas kvazaŭ tre simpla. Aperos ASE, jam delonge atendata, kaj ĝi solvos ĉiujn demandojn, gvidos la tutan movadon. Estu tiel! Ne havante iujn konkretajn donitaĵojn (ankaŭ stranga afero!), estas malfacile antaŭvidi ion pri estonta ASE-laboro. Sed eĉ la maniero de prepar-laboro pruvas, ke apenaŭ ASE tuj kreos absolute novajn kondiĉojn por E-movado. Kaj nature aperas la demando: ĉu efektive la kreo de ASE nepre subkomprenigas SEJM-likvidon? G.M. Gercikov estas prava: temas ja ne pri titolo, sed pri tuta branĉo de nia movado, nome la junulara. Ĝi ja devas ekzisti! Kaj ĝi ekzistu kiel junulara (aŭ iu ajn) sekcio de ASE, alie E-movado povos maljuniĝi, fariĝi akademia, do ne alloga por junularo. Kaj ĝenerale, ĉu necesas pravi tion? Ja ne nur en esperantista vivo ekzistas apartaj junularaj organizaĵoj. Ekzistas junulara sporto, turismo, kluboj, eĉ komunistaj organizaĵoj (komsomolo!) ktp. Do, pri tio necesas nepre pensi, antaŭ ol paroli pri memlikvido de SEJM, ĉar ni ne scias, ĉu vere okazos automata transpreno de la taskoj, aŭ la agaddirekto ŝanĝiĝos.

Kaj dua demando, ligita kun la memlikvido. Kiam mi legis materialojn de la lasta SEJM-Konferenco, mi atentis la opinion de V. Aroloviĉ pri individuaj subtenantoj. Li diris, ke pri individua subtenado eblos rezigni. Poste tio estis ĝustigita per enketo de la E-Komisiono. Ĝi estis dissendita al kluboj. Sed en nia lando ekzistas urboj kie loĝas 1 - 2 esperantistoj entute. Kion ili faru - ĉu organizu klubon el du personoj? Ĉu ne elfalos ili nerevenigeble el E-agado sen individua subtenanteco (evidente, ĝi ne estos en la novaj kondiĉoj)?

Do, mi proponas, aŭ pli ĝuste - konsentas kun antaŭe faritaj proponoj: ĝisatendi ASE-funkciigon; en nuna jaro labori eĉ paralele kun ĝi; kaj nur kiam efektive estos forta konvinko, ke ĉio estas en ordo, ke la movado daŭros sur la sama aŭ eĉ pli alta nivelo, - nur tiam starigi dum sekvonta, sendube pli reprezenta, Konferenco la demandon pri plua SEJM-laboro kaj post ĉiuflanka, serioza, afera pridiskuto solvi ĝin je la bono de E-movado.

B. Granat (Voroneĵ).

NE MISUZU PARTICIPOJN!

En la re-repliko de D. Kolker "Ĉu malperfekteco?" ("A"-5, p. 67) estas serioza lingvosenca neĝustaĵo: la esperanta kaj rusa frazeroj ne estas ekvivalentaj - ja "mi estis kaptinta" signifas "ja byl pojmovšim", sed ne "ja byl lovivšim", kiu siavice devus esti "mi estis kaptanta".

Atentu la aludatan frazon de D. Kolker: "Ja ankaŭ participo, se esti tro pedanta, ne ĉiam donas al ni ideon de nepra finiteco de la ago: "mi estis kaptinta" ("ja byl lovivšim") - ne nepre signifas ke mi sukcesis".

Tute ĝuste, ne ĉiu participo donas tiun ideon, ĉar participoj povas havi diversajn tempoformojn: prezencan (-ant-), futuran (-ont-), preteritan (-int-), kaj nur la lasta povas montri finitecon de la ago.

La donita ekzemplo ("mi estis kaptinta") montras precize kaj definitive la staton de sukcesa fino. Ja ĝi signifas, ke en iu momento pasinta mi jam kaptis, la ago finiĝis, ĉar alie mi ne povus esti kaptinta.

Interalie, la vorto "kapti" signifas "pojmatj", do definitive havi kaptajn en la manoj. La rusa vorto "lovitj" ne estas unusenca, ĉar ĝi povas signifi "ĉasi" (senkapte) kaj "kaptadi" (sukcese). La unua vortparo ("kapti" - "pojmatj") enhavas sencon de finfaro, la dua ("ĉasi" - "lovitj") - tiun de daŭra, ne nepre finita, ago.

V.Samođaj (Moskvo).

NI KONIGU ĜIN AL LA MONDO!

"Senanima skemo", "senkolora lingvo, ne naskinta eĉ unu originalan ideon", "neniu pli-malpli valora verko aperis en tiu artefarita lingvo", ktp. Ĉu sufiĉas? Ja ni, esperantistoj, delonge konas similajn eldirojn, kiuj fakte reprezentas antaŭjuĝojn, formiĝintajn pro manko de scio aŭ pro misscio. "Tio ne estas vero - ripetas ni denove kaj denove dum niaj prelegoj, en niaj priesperantaj artikoloj, - ekzistas multegaj tradukoj de mondfamaj verkoj en Esperanton, ekzistas originala literaturo, originala poezio." Ni diradas tion kun certeco, estante mem konvinkitaj pri tio. Ni ja havas la plezuron legi esperantlingvajn verkojn, multaj el ni ĝuas belajn poeziaĵojn de J. Baghy kaj H. Dresen, N. Hořilov kaj R. Rossetti, K. Kalocsay kaj W. Auld. Iam ni mencias iliajn nomojn, elpaŝante antaŭ ne-esperantista publiko. Sed la publiko? Nu, niaj aŭskultantoj aŭ legantoj de niaj artikoloj verŝajne devas kredi nin je la vorto, ja ili ne povas konvinkiĝi mem pri vereco de niaj asertoj. La homoj kutimas opinii: se en iu fremda lingvo aperas io bona, interesa, tion oni tradukas kaj publikigas en ilia nacia lingvo. Sed ĉu ofte (aŭ almenaŭ iufoje) oni povas vidi presitajn vortojn: "traduko el Esperanto"? Ŝajnas, ke ne. Kaj por la publiko tio signifas, ke nenio estas tradukinda el tiu "formala lingvo".

Ni mem ĉiutage konvinkiĝas, kiom kreiva estas Esperanto, kiel ĝi instigas al verkado: homoj, apenaŭ lernintaj la bazon de la lingvo, provas traduki en ĝin, aŭ eĉ verki ion propran, originalan, kvankam ofte mallertan. Ĉiujare okazas internaciaj konkursoj de E-verkantoj. Ankaŭ niaj enlandaj belartaj konkursoj, ekzemple "Muzo" aŭ "Liro", iĝas pli kaj pli altnivelaj. Aperas dum ili bonaj tradukoj el naciaj lingvoj en Esperanton, aperas originalaĵoj. Ĉio ĉi estas tradicia por Esperanto kaj esperantistoj - ja dank' al tio dum la naŭ jardekoj la lingvo evoluis, iĝante ĉiam pli riĉa, fleksebla, kaj atingis tion, kio ĝi estas nun. Tamen, tio estas agado "internen", sed ne "eksteren". Kaj ĉu ne venis tempo por tiu ĉi lasta? Se ekzistas E-kulturo, ni konigu ĝin al la mondo.

Jes, tio estas granda respondeco. Altnivela belartaĵo postulas altnivelan tradukon. Malbona traduko kompromitos la originalon. Kial ĉe niaj konkursoj ne kresku nova branĉo - tiu de tradukaĵoj el Esperanto? Ĉu ne povas tie riveligi novaj talentoj? La proksima estonto promesas al ni bonajn ŝanĝojn, novajn eblojn. Kial do ne komenci akumuli bonajn elesperantajn tradukojn? Kelkiom da ili jam ekzistas. Do aperu iam sub publikigita bela verko: "traduko el Esperanto".

N. Cvileneva (Ufa).

KELKAJ KONSIDEROJ

Ricevinte "Kurte" N^o54, mi trovis en la koverto ankoraŭ kvarpaĝan mesaĝon, titolitan "Al gvidantoj de esperantistaj kluboj, grupoj, sekcioj, rondetoj, al ĉiuj E-aktivuloj". La mesaĝo, tre grava

laŭ la enhavo kaj esenco, ne estas subskribita. Tial mi ne povas skribi rekte al ties verkintoj kaj decidis uzi la paĝojn de "Aktuale".

Por komenco mi citas el la artikolo de V.Ŝilas en "Aktuale" N^o 4(58): "La fondo de ASE okazas en atmosfero de sekreteco (ekz., ĝia statutprojekto ne aperis en 'A')".

Ĉu oni povas post tio miri, ke "iuj esperantistoj (bedaŭrinde kaj strange, ke inter ili kelkaj konataj aktivuloj) la aferon rilatas tre suspekteme, nekonfide kaj entreprenas skismajn paŝojn" (la mesaĝo, p.4)?

La aŭtoroj de la mesaĝo asertas: "Projekton de Regularo ellaboris elstaraj esperantistoj de nia lando, inter ili membroj de SEJM-Komitato, do, pri ĝia perfekteco ne dubu" (la mesaĝo, p.4).

Unue, aperas natura demando. Se la perfekteco de la statutprojekto estas ekster ĉia dubo, kio malhelpas konigi ĝin al la esperantistaro, almenaŭ al gvidantoj de esperantistaj kluboj, grupoj ktp. (vidu la titolon de la mesaĝo)? Oni povus prave supozi, ke "kelkaj konataj aktivuloj" rilatus al la afero pli konfide, se ili povus studi la statutprojekton kaj konvinki, ke la tuta entrepreno estas serioza, solida kaj staras sur firma bazo.

Due, ĉu tamen okazos pridiskuto de la statutprojekto? Kie, kiam kaj kiel? Oni diras, ke la pridiskuto okazos dum la fonda konferenco. Mi meditas, kiamaniere tio fakte okazos? Jen, kamarado X. venis al la fonda konferenco. Li u n u a f o j e en sia vivo aŭskultas la statutprojekton kaj aŭdas: "Kiu estas por? Kiu estas kontraŭ?" - necesas decidi t u j. Sed kie estis tempo por trankvile studi kaj pripensi la projekton?

Ja kio estas pridiskuto ĝenerale? Ties partoprenantoj esprimas diversajn opiniojn pri la samaj demandoj, klopodas argumentite konvinki unu la alian, trovas erarojn kaj ceterajn mankojn unu ĉe la alia, iom post iom cedas unu al la alia, kaj finfine ellaboras komunan konkludon. Necesas nur unu nepra kondiĉo: oni havu eblon atente studi la problemon antaŭ ol partopreni en ĝia pridiskuto.

Mi konkludas: estis grava eraro, ke la statutprojekto ne estis konigita al la esperantistaro. Nun estas jam malfrue ion ŝanĝi. Tiuokaze almenaŭ la partoprenantoj de la fonda konferenco ricevu la projekton por studi ĝin.

La aŭtoroj de la mesaĝo esprimas bedaŭron kaj ĉagrenon, ke multaj esperantistoj rilatis al la letero-enketo, ricevita de SSOD, nesolide, neserioze. Poste sekvas vico da konsiloj pri la necesaj respondoj. Tre bonaj kaj nepre atentendaj konsiloj, sed... Kie do vi estis pli frue, karaj aŭtoroj? Kial vi ĝustatempe ne klarigis, kiel oni devas respondi la starigitajn demandojn? Do kiu estas kulpa? Jen, ekzemple, la aŭtoroj de la mesaĝo malkontentas, ke ne estas ricevitaj informoj pri multaj i n d i v i d u a j esperantistoj (ne klubanoj). Ili skribas: "En la rubrikoj 'Deziras korespondi' de ĉiuj E-gazetoj kaj revuoj ĉiam abundas sovetianoj, ofte tute nekonataj el tute nekonataj por E-movado lokoj. Tio estas nur kelkaj pruvoj, montrantaj, ke en Sovetio ekzistas multaj esperantistoj, nur necesas ilin evidentigi" (la mesaĝo, p.2). Nu, kion eblas diri ĉi-rilate? Verŝajne, plejmulto da "nekonataj esperantistoj el tute nekonataj por E-movado lokoj" a n k o r a u n e n i o n s c i a s pri la estonta ASE. Kiu povis informi ilin? Kiu kaj kiamaniere povis klarigi al ili, kiaj donitaĵoj estas necesaj ktp.? Kaj ankoraŭ unu grava konsidero. Laŭ onidiroj (alia maniero de informigo ne eblis, ĉar la statutprojekto ne estis konigita), membroj de la estonta ASE povos esti nur esperantistaj kolektivoj, sed ne apartaj esperantistoj. Iu solulo en "nekonata loko" ekaŭdis pri tio kaj diris al si: "Tre domage, ke mi ne rajtos

esti membro de ASE"... kaj opiniis semutila sendi iujn ajn informojn pri si.

Ni, esperantistoj-aktivuloj en Gorkij, havis eblon studi la statutprojekton, ricevinte ĝin por trarigardo. Trovinte en ĝi plurajn gravajn mankojn (certe, nur laŭ nia opinio), ni forsendis niajn rimarkojn kaj proponojn en Moskvon. La senco de la ricevita respondo estis: viaj konsideroj estos atentitaj.

Kiajn mankojn ni trovis en la statutprojekto? Jen ekzemplo. Estas antaŭviditaj multaj celoj de la estonta ASE, sed inter ili **f o r e s t a s a p l i k o d e E s p e r a n t o p o r s c i e n c - t e k n i k a i n f o r m a d o.** Absolote ne estas klare, kiujn devojn kaj rajtojn havos apartaj **i n d i v i d u a j** esperantistoj (la statutprojekto pritraktas **n u r** kolektivojn).

Pri la membreco necesas diri aparte. Laŭ la statutprojekto, membroj de ASE estos **n u r k o l e k t i v o j**, sed ne apartaj esperantistoj. Nu, ni akceptu tion por kelkaj minutoj. Poste mi legas en la projekto, ke siajn monrimedojn ASE ricevas, krom aliaj fontoj, de siaj kolektivaj membroj. Sed de kie kolektiva membro ricevas monon por sendi al ASE? Evidente, de siaj apartaj anoj. (Ne nepre. - La red.) Sekve, apartaj anoj de E-kolektivoj devos pagi iun kotizon. Kial do oni ne volas konsideri ilin kiel **m e m b r o j n** de la organizaĵo?

Oni devas distingi du diversajn aferojn: membrecon en la organizaĵo kaj ĝian strukturon. La strukturo estas priskribita en la statutprojekto, la plej malsupera subdivido estas esperantista kolektivo. Samtempe tiu kolektivo estas nomita membro de la Asocio. Mi opinias tion grava eraro. Mi volas substreki: ASE devas antaŭvidi **i n d i v i d u a n** membrecon. Se tamen oni decidis, ke membroj de ASE estos **n u r k o l e k t i v o j**, tiukaze la organizaĵo ricevu alian nomon: anstataŭ "Asocio de Sovetaj Esperantistoj" ĝi estu "Asocio de Sovetaj Esperantistaj Kolektivoj".

Eble mi skribas tro malfrue, eble miaj konsideroj estos publikigitaj jam post la fonda konferenco kaj tial neniom influos ĝin, tamen mi ne povas ne esprimi mian opinion pri la problemo.

V. Beŝkarev (Gorkij).

(daŭrigo el p.69)

POR Esperanto, ofte farante eĉ tiajn paŝojn, kiujn neniu povas kompreni. Do oni ne miru, ke ekzistas ĝenerala kaj forta opinio, ke la esperantistoj estas homoj strangaj, nesociemaj, ke forgesante la propralandan medion ili strebas havi kontaktojn kun eksterlando, veturadi tien, ricevadi "nepermeseblan" literaturon ktp.

ASE estas kreata por fini tiun **n e r e g a t a n** aventuremon, por ordigi la **E-agadon** sub la kontrolo kaj kun helpo de SSOD, Komsomolo, Profesiaj sindikatoj. La preparon de la Regularprojekto por la Asocio partoprenis konataj esperantistoj kaj respondecaj neesperantistoj, **s e k v e** iu kompromiso estis neevitebla. La projekto ne estas "perfekta", sed ĝi ankaŭ ne estas malbona, ĉar donas sufiĉajn eblojn por fruktodona peresperanta agado enkadre de amikec-asocioj, komsomolaj kaj sindikataj organizaĵoj. La peresperanta laboro nature bezonas esperantistojn, kiuj povas naskiĝi nur dank' al poresperanta laboro.

La tasko de esperantistoj estas ne ignori la kreatan Asocion, eĉ se ne ĉio plaĉos en ĝi, sed aktive aliĝi kaj per sia loka kaj centra laboro perfektigi, eduki la novnaskoton, adaptiĝi al la nova vesto kaj poiome adapti tiun veston al la bezonoj de nia lando. Nur tio povas naski fidon al nia agado, donos pli vastajn eblojn por plifirmigo de Esperanto, por ĝia **i n s t r u a d o** kaj pli larĝa aplikado.

Ĉu malfondi SEJMon? Mi, unu el ĝiaj kunfondintoj kaj la nomin-

to, ne povas tion sugesti. Ĝi devas resti kaj funkcii, aliforme, alinome, enkadre de ASE, sed same brave kaj pli sagace, ne forgesante, ke nia porsocia laboro PEResperanta kreas fortan bazon de la agado POResperanta.

V. Samodaj (Moskvo).

KIEL ATINGI SUKCESOJN EN INSTRUADO DE ESPERANTO
(demandoj kaj respondoj)

En "Aktuale"-6(39) aperis mia artikolo pri nova metodo por instrui Esperanton. Poste venis al mi multaj leteroj kun demandoj pri diversaj detaloj de mia metodo, pri kiuj mi ne parolis en la artikolo. Mi supozas, ke la respondoj interesos nespertajn, kaj eble ankaŭ spertajn, instruistojn kaj organizantojn de E-kursoj. Tial la demandojn kaj respondojn mi proponas por publikigo.

Demando: Kia devas esti la unua letero de komencanto eksterlanden, la letero kiu lin "alhokus" kaj garantius respondon?

Respondo: La unua letero devas esti tre kurta, simpla propono pri korespondo, interŝanĝo kaj NEPRE reciprokaj vizitoj, eĉ se tiuj lastaj estas malfacilaj por realigo. Anonco pri reciprokaj vizitoj estas plej forta stimulilo por respondi al koresponda propono. Apliko de Esperanto en turismo nun estas plej efika instigilo por lerni Esperanton kaj serĉi leterajn amikojn en eksterlando. Internacia korespondado ankaŭ sen vojaĝoj forte influas decidon lerni Esperanton, sed ne en tia grado, kiel espero utiligi la internacian lingvon dum eksterlandaj vojaĝoj.

Demando: Kiom da unuaj sinproponaj leteroj aŭ bildkartoj sendu la komencanto, por ricevi sufiĉan kvanton da leteraj amikoj?

Respondo: La sperto montras, ke reeĥas proksimume triono da personoj, al kiuj oni sendas la proponojn. La komencanto devas havi proksimume 40 - 50 korespondantojn por ĉiusemajne ricevadi 3 - 5 leterojn, ĉar ja multaj korespondantoj respondas malofte, parto pro diversaj kaŭzoj tute ĉesas korespondi. Sed entuziasmon de la komencanto devas konstante "varmigi" novaj leteroj kun belaj bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, libroj, revuoj ktp. Nur tiu entuziasmo povas iom post iom transformiĝi en konstantan samideaniĝon. Do estas dezirinde, ke komencanto sendadu tiom da proponoj, ke li finfine atingu 30 - 50 respondojn. Foje tio okazas rapide, alifoje necesas sendi eĉ 120 proponojn. Sed kompense la komencanto iĝas riĉulo je korespondaj ligoj kaj dronas en la E-maro, kion ĝuste celas la instruisto.

Demando: Kie preni tiom da korespondantoj?

Respondo: En socialismaj landoj. El kapitalismaj landoj leteroj ne ĉiam nin atingas, tial necesas kalkuli antaŭ ĉio je la socialismaj. En ili troviĝas pli ol dek miloj da organizitaj esperantistoj kaj ĉirkaŭ triobla aŭ kvarobla kvanto da neorganizitaj. Jen estas plugebla kampo por personoj, kiuj serĉas korespondantojn. En kapitalismajn landojn ne indas sendi korespondajn proponojn, ĉar de tie nin atingas precipe registritaj leteroj, tamen esperantistoj el kapitalismaj landoj tute ne emas registri siajn leterojn, ĉar ilialandaj poŝtoj prenas tre multe da mono por registro de leteroj.

Demando: En komenca periodo la lernantoj ne povas kompili konvenajn leterojn, sed Vi rekomendas, ke jam dekomence ĉiu lernanto sendu ĉiusemajne po unu aŭ po kelkajn leterojn. Kiel solvi tiun malfacilan taskon?

Respondo: La instruisto devas verki por komencantoj proksimume 50 aŭ 100 pretajn leterojn pri plej tipaj temoj. Ekzemplojn vidu fine de la artikolo. Ĉiu letero devas havi nacilingvan tradukon, kio ege ŝparas tempon de la lernanto kaj allogas tiujn homojn, kiuj ne havas paciencon serĉi signifojn de la vortoj en vortaroj. La ko-

mencanto reskribas ambaŭ tekstojn de la letero, lernas ilin tiel, ke la leteron li povu traduki el Esperanto najlingven kaj inverse. Jam tio estas bona leciono.

Demando: Sed tio estas praktiko. Kaj kiel Vi instruas gramatikon?

Respondo: En ĉiu leciono lernanto devas rakonti pri kelkaj gramatikaj reguloj, aŭ lige kun la leteroj, aŭ tute sendepende de ili.

Demando: Kiel preferindas instrui: individue aŭ kolektive?

Respondo: Laŭ vidpunkto de tempoŝparo certe estas konsilinde instrui kolektive, sed laŭ vidpunkto de lernokvalito rekomendindas ofte apliki principon de individua instruado, konsiderante ke la lernantoj havas diversajn kapablojn, diversajn gradojn de klereco, diversajn objektivajn kondiĉojn por lerni la lingvon, ktp. Ekzemple, nepre necesas aparte kontroli ĉiun sendotan leteron de komencanto, ĉar aliokaze la la letero povas esti skribita tiel, ke la korespondanto ne sukcesos ĝin deĉifri.

Demando: Se la lernantoj-komencantoj sendas identajn pretajn leterojn en komenca stadio de lernado, do povas okazi, ke eksterlanda korespondanto ricevos samtekstajn leterojn de diversaj personoj (aŭ eĉ de la sama, se li ne havas sufiĉe bonan memorkapablon). Kiel eviti tian malagrablaĵon?

Respondo: Ĉiu preta letero devas havi propran numeron. Krome, por ĉiu eksterlanda korespondanto endas ekhavi specialan registran folion, sur kiun necesas noti ne nur lian adreson, aĝon, profesion, interesojn ktp., sed ankaŭ numerojn de pretaj leteroj, senditaj al li. Post kelka tempo certe tiu komplika sistemo jam igas senbezona, ĉar la lernanto jam ekpovas memstare kompili leterojn.

Demando: Porinfanaj kursoj estas maloftaj. Kiel faciligi serĉadon de samagaj korespondantoj, se en la kurso lernas infanoj?

Respondo: En tiaj okazoj necesas, ke la infanoj strebu korespondi kun plenaĝuloj, ŝajnigante sin pli aĝaj, ĉar en mala okazo la plenaĝuloj ne deziras korespondi kun etuloj. Por tia ŝajnigado necesas disponi pri sufiĉa stoko da pretaj leteroj, kiuj povas taŭgi same por infanoj, kiel por plenaĝuloj; ekzemple, priskribo de urboj, rakonto pri ekskursoj aŭ pri la hejmo kaj familio, ktp. Laborema instruisto trovos senfinan kvanton da tiaj temoj. Necesas tempo kaj deziro de la instruisto, kaj la rezultoj ekfloros. Tiu ĉi metodo pri ŝajnigado de matura aĝo estas ne tute honesta, sed plene pardoninda. Ĉiuokaze, ne ekzistas nun por infanoj alia rimedo, se infana E-grupo estas sufiĉe granda.

Demando: Kiel varbi novajn kursanojn?

Respondo: Por tio utilas ne nur esti elokventa en propagando de Esperanto aŭ disponi pri konvinke kompilita propaganda broŝuro. Ege celkonforme estas havi dikan albumon kun belaj eksterlandaj bildkartoj kaj poŝtmarkoj, akiritaj dank' al E-korespondado. Ofte sufiĉas montri tian albumon al infanoj, aŭ gejunuloj, aŭ plenaĝaj kolektantoj, por ke ili tuj decidu kursaniĝi. Sin pravigas, kaj en alta grado, ankaŭ jena rimedo: sur grandan tukon de proksimume litkovri-la formato oni fiksas aron da belaj bildkartoj kaj poŝtmarkoj eksterlandaj. Tio estas siaspeca portebla, lokigebla eĉ en teko aŭ valizeto, ekspozicio, kiun estas tre facile montri ekzemple en lerneja klaso, poste ĝin kunfaldi kaj transporti en alian klason aŭ pendigi en vestiblo, fabrika tralasejo aŭ alia loko, el kiu oni esperas ĉerpi novicojn. Samtempe kun tia transportebla ekspozicio endas fari mallongan prelegon pri la E-kurso, pri la lingvo kaj movado, pri la utiloj, kiujn povas alporti ekregio de la internacia lingvo, aŭ pendigi apud la ekspozicio konvenan afiŝon. La rezulto estas certa: nepre ia kvanto da homoj, proksimume 1 - 5%, kursaniĝos. Se ekzemple en lernejo estas mil lernantoj, oni povas esperi, preskaŭ certi, ke aliĝos proksimume 15 - 20 geknaboj. Tio estas serioza nombro por kurso. La samo koncernas plenaĝulajn instituciojn. Eĉ se

la ekspozicio ne altiras homojn, kiuj ne emas kolekti bildkartojn aŭ poŝtmarkojn, tamen ĝi certe altiras ĉies atenton al prelego aŭ afiŝo.

Demando: Ĉu vere Vi postulas, ke eksterlandaj korespondantoj skribu ne laŭ adresoj de lernantoj, sed laŭ tiu de la instruisto?

Respondo: Jes. Se eksterlandaj leteroj venas laŭ adreso de la instruisto, li "komandas la paradon". Nome, li povas kontroli, ĉu kaj kiel respondas la lernanto la venintajn leterojn (ofte lernanto ricevas leteron kun belaj bildkartoj kaj poŝtmarkoj, sed pigras rekompenci la korespondanton per la samo). Li povas komence postuli, ke la lernanto skribu konvenan respondon, almetu belajn bildkartojn kaj poŝtmarkojn kaj ekzameniĝu pri hejmaj gramatikaj taskoj, kaj nur poste doni al la lernanto la sopiratan eksterlandan leteron. Se lernanto ial ne plu deziras korespondi, la instruisto povas trovi alian korespondanton por la eksterlanda plumamiko, kiun trovi ne estis facile. Sed se la leteroj venas rekte al la lernantoj, ili povas pro kutima neglektemo tute ne respondi, aŭ respondi kun granda prokrasto, aŭ tre malkonvene, kun multaj eraroj, ktp.

Demando: Kion enmetu lernanto en sian eksterlandan leteron por esperi aŭ certi pri respondo?

Respondo: Antaŭ ĉio la letero mem devas esti interese verkita, la enhavo devas esti laŭeble originala. Pri tio respondecas komence la instruisto. Krome, en la leteron oni nepre enmetu unu aŭ plurajn belajn kolorajn bildkartojn. Fakte, estas permesite en socialismajn landojn sendi en unu koverto ĝis 10 bildkartojn, sed necesas memori pri adekvata afranko konforme kun pezo de la letero. Tre dezirindas en ĉiu letero sendi humuraĵon, kanton aŭ ion ajn alian, kio supozeble plaĉos al la korespondanto. Kaj nepre necesas zorgi pri afranko per belaj, sed ne ajnaj, poŝtmarkoj. Se tiel zorge aranĝitan leteron ricevas eksterlanda esperantisto, estas alta ŝanco, ke li bonege reciprokos. Devo de la instruisto estas konstante atentigi lernantojn pri ĝusta maniero sendi leterojn eksterlanden. Se la instruisto neglektas tiun devon, liaj lernantoj ne povas akiri eksterlandajn plumamikojn kaj nature seniluziiĝas pri dezirindeco lerni Esperanton.

Demando: Kiel grandaj devas esti leteroj de komencantoj?

Respondo: Por unua letero - proksimume kvin liniojn. Poste - ĉirkaŭ dek liniojn. Tio estas bona normo por kelkaj unuaj monatoj. Necesas ja konsideri, ke skribado de leteroj estas grava ŝarĝo por kursana menso. Proksimume post unu jaro la lernantoj kutime povas sen granda cerbostreĉo skribadi leterojn jam dudekliniajn. Se la instruisto postulas, ke la lernantoj jam de komenco skribu longajn leterojn, li nur forpuŝos siajn kursanojn. Nepre necesas ĉi-rilate apliki rigore laŭgradan sistemon de lerna ŝarĝado.

Demando: Kie preni adresojn de eksterlandaj korespondemuloj?

Respondo: Estas diversaj fontoj por tio: 1) la instruisto devas aboni ĉiujn aboneblajn revuojn, kiuj aperigas korespondajn adresojn; 2) la klubo mem devas sendi en tiujn revuojn anoncon pri korespondo; 3) la instruisto devas jam anticipe, antaŭ arango de la kurso, havi kontaktojn kun pluraj eksterlandaj E-kluboĵ, instruistoj, delegitoj de UEA, korespondaj servoj. Helpi ĉi-rilate povas ankaŭ koresponda servo de SEJM (226014 Riga, p.k. 33, Saulcerite NEILANDE). Adresojn de delegitoj oni povas trovi en Jarlibro de UEA. Mi povas sendi kelkajn centojn da adresoj de socialismlandaj korespondemuloj kaj adresojn de personoj aŭ organizaĵoj, kiuj povas liveri adresojn de korespondemuloj (estroj de korespondaj servoj, delēgitoj de UEA kaj aliaj).

Demando: En kiuj medioj oni devas antaŭ ĉio serĉi lernantojn por E-kurso?

Respondo: Evidente, plej taŭga estas la junulara medio. Tamen estas dezirinde havi sekcion de infanoj, kiujn estas relative tre

facile varbi per bildkartoj kaj poŝtmarkoj. Same grava povas esti partopreno de plenaĝuloj, kiuj kapablas tre serioze labori por Esperanto.

Demando: Kie Vi prenas lernolibrojn kaj vortarojn?

Respondo: Nun ekzistas bona lernolibro de Kolker, disvastigita tra la tuta lando. Sed se mankas lernolibro, mi igas la lernantojn reskribi gramatikajn regulojn en specialan kajeron. Se mankas vortaro, la lernantoj mem iom post iom kompilas ĝin dum lecionoj kaj dum skribado de leteroj.

Demando: Ne ĉiuj novaj lernantoj havos tempon aŭ deziron skribi proksimume 50 sinproponajn leteretojn por akiri sufiĉan kvanton da korespondantoj. Kion fari en tiaj okazoj?

Respondo: Unue, tiuj sinproponaj leteretoj estas tiel mallongaj (4 - 5 linioj), ke preskaŭ ĉiu novico konsentas skribi tian kvanton. Tamen en okazo de rifuzo aŭ tempomanko oni povas solvi la problemon jene: la instruisto devas trovi adresojn de eksterlandaj E-kursoj, laŭeble plej multnombraj, kaj interkonsenti kun iliaj estroj, ke ties lernantoj-korespondemuloj sendu siajn korespondproponojn. Dank' al tiu metodo eblas ŝpari tempon kaj penon, necesajn se la lernantoj mem serĉas la letoramikojn.

Demando: Ofte okazas tiel, ke alvenas el eksterlando korespondan propono de esperantisto en tia aĝo, ke oni ne povas trovi por li samaĝan korespondanton, tamen pro diversaj konsideroj estus domaĝe perdi la korespondeblecon. Kion fari?

Respondo: Tre simple: refoje iomete peki per senkulpa mensogeto. Se la proponinto estas alloga korespondanto, do deziranto akcepti la proponon skribu: "Mi estas en via aĝo". Tia mensogeto estas tute pardonebla.

Demando: Al mi ŝajnas, ke Vi proponas troan korespondan ŝarĝon, tiel por instruisto, kiel por lernanto. Ĉu ne povas tio igi ilin ambaŭ rezigni pri Via sistemo?

Respondo: Se tempo, disponebla por Esperanto, estas tre limigita ĉe instruisto kaj kursanoj, se mankas sufiĉa mono por multaj kovertoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, aŭ se aperas danĝero de trosatiĝo, tedigo pro abunda korespondo, tiam evidente necesas malpliigi la internaciajn korespondajn rilatojn ĉe unuopaj lernantoj ĝis proksimume 5 - 10 leteraj ligoj. Sed endas ne forgesi, ke internacia korespondo ekde la komenco de lernado estas NEPRE necesa stimulo por lerni la internacian lingvon. Mi ripetas, ke ekzistas ankaŭ eblo akiri, sen granda peno kaj sen perdo de multa tempo kaj mono, sufiĉan kvanton da korespondantoj, se la instruisto havas kontakton kun eksterlandaj kolegoj, kiuj same spertas bezonon pri eksterlandaj korespondaj ligoj. Sed mi refoje emfazas, ke unu korespondanto ne sufiĉas, ĉar liaj leteroj venados proksimume unu fojon monate aŭ eĉ pli malofte. Tio estos nesufiĉa "injekto" de intereso por lerni Esperanton.

Demando: Kiaj devas esti temoj de leteroj eksterlanden?

Respondo: Ĉiu temo estas bona, se ĝi estas saĝe prilaborita. Sed ni, sovetaj esperantistoj, kaj ĝenerale esperantistoj de socialismaj landoj, devas memori, ke E-korespondo servu ne nur al privataj bezonoj de niaj korespondantoj, sed ankaŭ NEPRE al propagando de nia ideologio. Ni devas rakontadi en niaj leteroj pri la gigantaj atingoj de la soveta ŝtato en la konstruado de socialismo kaj pri la ĉefaj celoj de la soveta politiko: paco en internaciaj rilatoj kaj strebo al hela estonteco de laboruloj - komunismo. Ekzistas multaj sovetaj atingoj, pri kiuj la esperantistoj povas kun granda fiero rakonti en siaj leteroj. Jen kelkaj ekzemploj: en Sovetio ne ekzistas senlaboreco, kiu estas plago de la kapitalismaj landoj; ĉiu soveta civitano povas kuracigi senpage, dum en la kapitalismaj landoj la kuracado estas tre multekosta; sovetaj homoj lernas senpage kaj eĉ ricevas stipendiojn por profesiaj studoj; tiuj sovetaj

nacioj, kiuj antaŭ la revolucio estis postrestintaj kulture kaj ekonomie, nun povas fieri pri nivelo de siaj kulturo kaj ekonomio; inter la sovetaĵoj, kies nombro superas centon, ekzistas amikeco, frataj rilatoj; ktp. Rigardu atente ĉirkaŭen, kaj vi trovos multajn dekojn da temoj, pri kiuj rakontante en leteroj, vi plenumos vian patriotan devon.

Demando: Ĉu necesas promesi al komencantoj eksterlandajn vojaĝojn, kiuj ja ne ĉiam estas facile realigeblaj?

Respondo: Estas malfacile, tamen eble. Do la instruisto ne nur rajtas esperigi komencanton pri eksterlanda vojaĝo, sed eĉ devas tion fari, ĉar tia espero estas plej potenca instigilo por lerni Esperanton. Finfine, se novico ne sukcesos promeni ekster la ŝtatajn limojn, pri tio kulpos ne Esperanto, nek la instruisto, sed objektivaj cirkonstancoj, kiuj ne dependas de esperantistoj. Kompreneble, dank' al promesoj veturi eksterlanden, la novicoj ellernas la internacian lingvon, uzas ĝin en korespondado, konvinkigas ke Esperanto estas bona solvo de la internacilingva problemo, kaj krome, iuj el la novicoj, se ili havas konvenan karakteron, iĝas E-aktivuloj, kiuj laboras por Esperanto ne pro la eblo veturi eksterlanden, sed ĉar al ili ekplaĉis aktivigi por efektivigi la ideon de internacia neŭtrala kaj facila lingvo.

Demando: Ĉu endas postuli, ke lernantoj plenumadu grandajn taskojn dum lernado de la lingvo?

Respondo: Se vi tro multe postulos, la lernantoj diskurcs. Plej grava tasko de la instruisto estas vekigi intereson por la internacia korespondo. Se lernanto estas pacienca, diligenta, lernema, legema ktp., post vekigo de intereso li mem tiel energie eklernas Esperanton, ke li memstare ĝin ekregos post kelkaj monatoj aŭ eĉ semajnoj. Sed se lernanto estas pigrulo kaj krome malklera, aŭ se li ne havas sufiĉe da libera tempo, nuraj lecionoj kun la instruisto unu fojon semajne aŭ dusemajne, aŭ des pli monate, donos nulan rezulton. La lernanto iĝos eterna komencanto. Plej grava estas propravola kaj proprainiciata laboro de la lernanto. La instruisto donu "puŝon", kaj la lernanto jam mem ruliĝu plu. Tio ne ekskluzivas konstantan helpon de la instruisto, sed necesas memori, ke pleje gravas memstara laboro de la lernanto. Ne hazarde oni diras, ke nur homoj kun specialaj karakteroj iĝas veraj esperantistoj.

Demando: Se ekzistas abundo da korespondaj adresoj, kiel elekti plej gustajn partnerojn?

Respondo: Se estas eblo, necesas konsideri aĝon, profesion, hobiajn kaj aliajn cirkonstancojn, kiuj povas naski komunajn interesojn. Kaj estas tre grava afero, ke la instruisto, kiu decidas pri distribuo de la adresoj, klopodu ĉiam, se eblas, kontaktigi ne korespondantojn de la sama sekso, sed gekorespondantojn. Estas konata, tute nekontestebla afero, ke intersanĝo de leteroj inter gekorespondantoj ĉiam enportas en la leterojn aldonan intereson, precipe kiam ili estas gefraŭloj. Ni memoru, ke kelkfoje Esperanto fariĝas edzperanto...

Ekzemplaj leteroj.

Unua sinpropona letereto: Estimata samidean(in)o! Mi proponas al Vi korespondi kun mi kaj intersanĝi belajn kolorajn bildkartojn, poŝtmarkojn, revuojn, librojn kaj aliajn objektojn. Mi dezirus inviti Vin gaste en mian urbon. Mi sendados al Vi ĉion, kio Vin interesas kaj kion mi povos sendi, ekzemple: kantojn, humuraĵojn ktp. Mi Vin salutas.

Letero de instruisto al instruisto: Estimata koleg(in)o! Mi gvidas E-kurson por 20 lernantoj en aĝo de 16 ĝis 60 jaroj. Por ke ili lernu Esperanton kun konstanta intereso kaj ne tro frue forkuru, mi proponas al Vi starigi korespondadon inter miaj gelernantoj kaj la Viaj, sendepende de tio, sur kia nivelo troviĝas ilia lingva scio. Pri kompilado kaj tradukado de leteroj de miaj lernantoj zor-

gos mi mem, do mi povas garantii, ke la leteroj estos konvenaj. Mi esperas, ke Vi same agos, por ke Viaj gelernantoj pli forte "infektigu" je esperantista entuziasmo.

Sinprezenta deklinia letero: Estimata samidean(in)o! Mi deziras kun Vi korespondi kaj intersangi bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Mia profesio estas la sama, kiel ĉe Vi. Mi estas proksimume en Via aĝo. Mi povas inviti Vin gaste en mian urbon. Mi estas fraŭlo. Min interresas ĉiuj korespondaj temoj, sed precipe tiuj, kiuj koncernas Vian landon. Evidente, mi multe rakontados al Vi pri mia lando, pri mia urbo, pri miaj privataj aferoj. Ĉar ni havas la samajn profesion kaj aĝon, mi certas, ke nia korespondado estos sufiĉe interesa por ambaŭ flankoj. Post kelka tempo, mi esperas, Vi venos en mian urbon kaj mi vizitos la Vian. Atendante Vian baldaŭan respondon, mi sendas al Vi plej korajn bondezirojn.

Letero pri niaj atingoj: Estimata samidean(in)o! Mi deziras kun Vi korespondi. Mi estas juna inĝeniero, ankoraŭ fraŭlo. Mi loĝas en kvarcambra loĝejo kun la avo kaj la gepatroj. Mia avo estas tre maljuna, aĝas sepdek naŭ jarojn. Antaŭ la Granda Oktobra Socialisma Revolucio li estis malriĉa kamparano, kiu ne posedis eĉ propran kabanĉon, ne parolante jam pri propra tero. Sed lia filo ricevis post la Revolucio mezan teknikan klerecon, kaj mi jam diplomiĝis kiel inĝeniero, laboranta sur tre respondeca posteno en grandega uzino. Nia loĝejo estas moderna, ekipita per ĉiuj eblaj komfortaĵoj. Ni vivas riĉe, posedas propran aŭtomobilon kaj vilaon ekster la urbo. Nia ŝtata domego, en kiu ni loĝas, staras en granda nova loĝa masivo. Tiajn novajn loĝajn masivojn konstruis la Soveta Ŝtato por pli ol cent milionoj da homoj. Jen tiel ni vivas en nia socialisma Patrio. Mi Vin kore invitas veni al mi gaste. Mi sendas al Vi plej varmajn bondezirojn!

Rimarkigo: La ekzemplajn leterojn NEPRE ne kopiu laŭvorte. Uzu ilin nur kiel proksimumajn modelojn! En mala okazo eksterlandaj korespondantoj povos ricevi el diversaj lokoj samtekstajn leterojn. Ĉiu instruisto devas mem verki por sia laboro ian kvanton da pretaj leteroj por komencantoj.

R. Grinšpan (700125 Taškent, Visokovoltnij massiv, Sajfulina 4).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

Informbultenon N^o1(13) de USEA. Ĝin malfermas ĉefartikolo "Renkonten al la oficialigo". Krome enestas: adresoj de novaj USEA-aligintoj, statistikaj donitaĵoj, informoj pri loka agado, anoncoj k.a.

NOVAĴOJ DE MOSKVA JUNULARA E-KLUBO

La 21-an de februaro vicprezidanto de la klubo D. Perevalov renkontiĝis en Sovetia Pacdefenda Komitato kun Ĝenerala sekretario de Unuiginta Fronto por Nacia Saviĝo de Kampuĉio k-do Roŝ Samaj, rakontis pri la labortago por Kampuĉio, organizita de la klubo, kaj transdonis al li fotoĵojn kaj gazetinformojn pri la evento (vidu ĉi-numere, p. 70 - 71).

Ekde februaro 1979 Moskva junulara E-klubo laboras sub oficiala gvido de Lenina rajkomo de komsomolo en Moskvo.

POR LA KURSA LABORO

"Esperanto kaj internacia edukado" bezonas materialojn pri internacia agado de E-klubo (prunte por uzo aŭ tuja kopiado) Aleksandr Kalaŝnikov: 334265 Krimea regiono, Artek, do vostrebovanija.

La informilo estas uzenda nur enlande! Printajpita 2.3.79.
Redaktis V. Aroloviĉ: 121019 Moskvo G-19, do vostrebovanija.